

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Augusto/Septembro/Oktobro 1974



Bamberg nia jarkunvenloko 1974



La famkonata malnova urbdomo

Antaŭ la jarkunveno en Bamberg

Tiu jaro estis markita per du grandiozaj internaciaj kongresoj, tiu de IFEF en Tarragona kaj tiu de UEA en Hamburg. Plua grava evento alproksimiĝas, la jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) en Bamberg (Bavario) inter la 11a kaj 13a de Oktobro 1974.

Bavario estas la plej granda lando en la Federacia Respubliko Germanio. Bamberg situas en la norda parto, kiu nomiĝas Frankonio. Apud Bamberg enfluas la rivereto Regnitz en la riveron Main. La urbo Bamberg kun siaj 77 000 enloĝantoj estas konata historie deponit pli ol mil jaroj. La imperiestro Henriko, la Dua, donis al la jam ekzistanta grafa kastelo la rangon de episkopejo por misionigi de tie la Slavojn. Bamberg estis submetita direkte la regno ĝis 1802, kiam finiĝis la erao de la Sankta Romia Imperio de Germana Nacio. La konstruaĵoj de la urba kerno trapasis sen evidentaj damaĝoj eĉ la lastan mondmiliton. Tiamaniere konserviĝis multnombraj juveloj de la germana konstruato kaj atestas ankoraŭ nuntempe pri la variaj historiaj etapoj; Bamberg situas sur pluraj montetoj. Laŭdire la placo antaŭ la romanstila katedralo estas unu el la plej impresigaj en nia lando pro sia ŝtona severeco. Dominanta poluso en tiu aro de turoj kaj pintaj tegmentoj estas la katedralo. Ĝi entenas la tombojn de siaj fondintoj, la imperiestro Henriko kaj lia edzino Kunigundo. Tie troviĝas aŭkaŭ la unusola tombo de papo en germana teritorio, kaj en la kriptoripozas la mortinta imperiestro Konrado, kiu partoprenis la krucomiliton kontraŭ la Araboj.

En baroka stilo leviĝas sur la sama placo la pompa Nova Residenco kaj en renesanca stilo la Malnova Korto, origine imperiestra palatino, kiu interne konservis sian mezepokan karakteron. De la najbara

AFEF-Jarkunveno en Salzburg

Tiu evento okazis jam dum la semanjfino 20/21a de Aprilo. Kvankam ni alvenis la tagon antaŭe preskaŭ je noktomezo, ni estis kore bonvenigitaj en la stacidomo. La sabata programo anoncis: „Post la tagmanĝo ekskurso. Vespere amuza ĉeesto kun muziko.“ Malantaŭ tiuj du koncizaj frazoj sin kaŝis belega tago

plena je diversaj ĝuoj. Post la manĝo ni eniris aŭtobusojn kaj ekveturis al Salzburgkamergut. Jen ni havis rigardon al la aŭtokonkursejo Salzburgring, jen ni preterpasis la lagon Fuschl. De malproksime salutis la „safmonto“ kaj baldaŭ ankaŭ ekbrilis la lago Mondsee, ĉirkaŭita de satverdaj herbejoj kaj majesta montaro. Sed ni daŭrigis nian vojaĝon al St. Wolfgang

apud la samnoma impona monaĥejo kaj preĝejo.

La kerno de la loĝita urbo Bamberg situas inter du branĉoj de la rivero Pegnitz. Sur rivera insulo elstaras la malnova urbodomo. Vicigiĝas dometoj de fiŝistoj, mallarĝaj stratetoj, mezepokaj preĝejoj. Ĉio atestas pri konservita historio. Tamen la diversaj etapoj ne ĉiam estis agrablaj. La princepiskopoj multe kontribuis al la kresko kaj floro de la urbo. Sed ili regis ofte rigore kaj subpremis dezirojn je aŭtonomio kaj reformoj en administracio kaj eklezio. Sed la enloĝantoj sentis sin pli kaj pli fortaj kaj riskis eĉ procesojn.

La periodo de regantaj princepiskopoj finiĝis en 1802, kiam per dekreto de la franca imperiestro Napoleono la tertitorio estas atribuita al la lando Bavario. Sekve de tio etendiĝis ĝenerala rezignacio kaj ekonomia regreso. Tamen la industria epoko kaptis ankaŭ Bamberg. Kreskis precipe la signifo de la bierfarejoj, laŭdire pli multnombraj ol la preĝejoj. Ankaŭ tekstilaj fabrikoj stariĝis. La kanalo inter la riveroj Main kaj Donaŭ estas konstruita. Nuntempe ĝi funkcias jam ĝis Nurembergo kaj minacas la interesojn de la fervojo. Kreskis ankaŭ la nombro de la lernejoj. Inter 1648 kaj 1803 ekzistis eĉ universitato. Multaj eminentuloj de la humanista kaj scienca mondo devenas el Bamberg aŭ laboris tie dum certa tempo. Tiu ĉarma urbo gastigos en Oktobro nin esperantistajn fervojistojn, la familianojn kaj espereble multajn gastojn. La plej multaj supozeble ne konas tiun regionon. Des pli multe semajnfina vizito estas rekomendinda. Kiu disponas pri pli longa tempo, ĝuu urbon kaj ĉirkaŭaĵon, ĉar Bamberg certe mertias nian intereson. Cetere atendos nin tre alloga programo.

W. B.

apud la samnoma lago por tie rigardi belan preĝejon kun fama malfrugotika altaro de Michael Pacher (ĉ. 1435 – 1498). Kompreneble multajn allogis la hotelo „blanka ĉevaleto“, sed por kaŝtrinki oni tamen kolektiĝi en la „nigra ĉevaleto“. La vetero estis belega, la suno brilis, la rigardon al la montaro ne ĝenis nebulaĵo kaj la etoso fariĝis tipe esperantista. Bad Ischl, kaj

la urbeto Mondsee estis pliaj celoj antaŭ ol la aŭtobusoj portis hejmen la gaje kontentan ekskursantaron. La tagon ni finis en restoracio, kie ni laŭprograme „amuze ĉeestis kun muziko“ — kaj kompreneble senlace dancis.

Dimanĉo, la 21a de Aprilo komencis jam je la 8a30 por la estraranoj kaj unu horon poste eklaboris ankaŭ la aliaj sub la sperta gvido de inĝ. Walter Huber. Pierre Robiolle (Francio) kaj Gernot Ritterspach (Germa-

nio) salutis flanke de la respektivaj IFEF-sekcioj kaj japana belulino direktis ankaŭ kelkajn vortojn al ni. Krome alvenis salutleteroj, i. a. de IFEF-prezidano Joachim Gießner, Pál Kristek el Budapeŝt kaj de la Venezia Esperanto-grupo „La Gondolo“. —

La estrarelektito pasis sen komplikaĵoj sub gvidado de Johann Geroldinger; unu-anime reelektita estis la antaŭa estraro. Fiere prezidanto Huber povis diskonigi, ke pro kresko de mem-

broj la aŭstria IFEF-sekcio ekde nun havos duan komitateton. Li prezentis Greta Gössl, kiu transprenis tiun taskon.

En 1975 niaj aŭstraj gekolegaj gastigos la IFEF-kongreson en Villach. Jam nun LKK vigle eklaboris por kontentigi ĉiun partoprenonton. Kun danko pro la belaj tagoj en Salzburg ni certigas al la tieaj geamikoj; „Kun plezuro ni estos venontjare denove inter vi!“

Elisabeth Ritterspach

Wilhelm Bulla 90 jarojn

La unuan de oktobro 1974 nia longjara fidela membro


Wilhelm Bulla

festos sian naŭdekan naskiĝtagon. Jam de kelkaj jaroj li loĝas en hejmo por maljunuloj St. Hedwig, 435 Recklinghausen, Im Romberg 28. En aĝo, kiun ne multaj el nia membraro atingas, nia ĉiam gaja kaj kontenta „maljun-prezidanto“ partoprenas regule la regionajn kunvenojn. Laŭnombre li okupas la pinton de la partoprenintara listo. Ĉiam akurata, Wilhelm Bulla ankaŭ vizitas Esperanto-aranĝojn ekstere de sia loĝurbo.

Ĝis antaŭ 3 jaroj li kuraĝis vojaĝi al la IFEF-kongresoj, en Aarhus kaj Tarragona li anoncis sin simbole. Lian biografion ni jam prezentis en Bulteno nro 1/73 sub la rubriko „Esperanto - veteranoj“.

Nia jubilanto — ĉar ankaŭ naskiĝtago kaj precipe 90a estas jubileo — estas tipa ekzemplo de homo, al kiu la lingvo Esperanto kun siaj multvariaj eblecoj ankoraŭ en la tria triono de la vivo donis kaj donas ne nur plezuron kaj multajn amikojn, sed eĉ iom da vivosenco. Jam 63jaraĝa, li eklernis la lingvon, nur du

jarojn antaŭ sia emeritiĝo. Kaj kiu vidis lin danci valson ankoraŭ antaŭ nur kvar, kvin jaroj dum IFEF-kongresoj kun ridaj okuloj, kiu kuras lian antaŭgajon je venonta kongreso aŭ jarkunveno, kiu memoras lian afablan, modestan sintena-



Wilhelm Bulla

don, tiu nur povas esprimi respekton al tiu ĉie ŝatata kaj estimata homo.

La GEFA-estraro kaj la tuta membraro reverencas kaj gratulas al Wilhelm Bulla je lia honora tago. Ni ĉiuj deziras al li ne nur, ke li en bona sanstato travivu tiun tagon kun multaj amikoj, sed ni esperas, ke an-

koraŭ sekvos multnombraj jarjo, kiuj ebligas al li viziti la tiom ŝatatajn regionajn renkontiĝojn, kiuj ankaŭ ebligas al li en lia hejmo daŭrajn kontaktojn kun lia amata lingvo pere de leteroj, revuoj kaj libroj. Kara Wilhelm Bulla: Restu rezistkapabla kaj vivoĝoja!

GEFA

Nürnberg

Pluraj nordbavaraj urboj eldonis aldonaĵojn esperantlingve al siaj belaj kaj multkoloraj urbprospektoj. Por pruvi al la urbaj administracioj, ke ili ne vane kaj ne senprofite elspezis la monon por tradukaĵo kaj presaĵo, mi petas kaj rekomendas mendi la Esperanto-prospektojn ĉe la „Städtisches Fremdenverkehrsamt“ en D-86, Bamberg, Postfach 3245, D-863 Coburg, Postfach 666, D-864 Kronach, Postfach 510 kaj D-862 Lichtenfels, Rathaus.

GEFA-jarkunveno 1974 en Bamberg Babila rondo vendredon, 11. 10. 1974

Ni kunvenos en la gastejo „Weierich“, Bamberg, Lugbank 5

Redaktfino por n-ro 6/74 estas la 10. 11. 1974.

El la grupoj

Wuppertal / Schwelm
Esperanto - ekspozicio en Schwelm.

La Esperanto - societo Schwelm, al kiu ankaŭ apartenas 7 membroj de GEFA, okazigas Esperanto-ekspozicion de la 12a de Julio ĝis la 12a de Septembro 1974 en la ĝiĉethalo de la ŝparkasejo en Schwelm.

En vitrino oni povas vidi Esperanto-librojn, instrulibrojn, gazetojn, leterojn kaj bildkartojn el multaj landoj, Esperanto-poŝtmarkojn kaj

eĉ leteron de d-ro Zamenhof. Sur 4 grandaj tabuloj estas klarigitaj la gramatiko de Esperanto.

Dum la inaŭguro de la ekspozicio ĉeestis la japanino Kazue Sugawara, kiu survoje al la Universala Kongreso vizitis amikojn en Schwelm. La varbestro de la ŝparkaso, s-ro Schmidt, oficiale salutis la Esperantistojn kaj transdonis al la japanino valoran donacon. 5 artikoloj kun 4 bildoj pri la ekspozicio aperis en la Schwelmaj gazetoj.

cian vervon de niaj kunvenoj, en niaj ski-semajnoj, kongresoj, kaj en ĉiuj niaj kunvenoj".

Ĝis revido do, se ne antaŭe, en Plan Val Gardena, Italio, por la 16-a Internacia Fervojista Esperanto Skisemajno, okazonta de la 15-a ĝis la 22-a de Februaro 1975.

Mi bezonas ĉies kunlaboron.

Mirella Merlani

Mia adreso estas:

MIRELLA MERLANI
via Giovanni Verga 69
00137 - ROMA / ITALIA



Esperanto - ekspozicion en Schwelm, de maldekstre al dekstre: ŝparkasvarbestro

Schmidt, Kazue Sugawara, Heinz Schindler, Annes Kronshage, s-ro Scholz



Mirella Merlani

La junurargvidantino skribas al Bulteno:

Mi dankas ĉiujn pro mia eletro en Tarragona kiel gvidantino de la fervojista esperantista junularo.

Mi invitas ĉiujn niajn gejunulojn sin impliki en sia lando precipe en la pliampleksigo de la rilatoj kun ne-esperantistaj junularaj organizaĵoj, pere de Espe-

ranto - kursoj, klopodante plue disvastigi nian lingvon inter la gejunuloj.

Mi sugestas, ke ĉiu junulo sendu leteron aŭ artikolon al sia nacia fervojista revuo, tiel ke oni konstatu la intereson, ke Esperanto vekas ankaŭ ĉe la junaj fervojistoj, kiuj legas la revuon. Samtempe, ni zorgu konservi la junularan interna-

Esperanto-Lehrgang in Schwelm

Am Freitag, dem 20. September 1974 beginnt in der Volkshochschule Schwelm ein Esperanto-Lehrgang für Anfänger. Wolfgang Loose unterrichtet von 20 - 21.30 Uhr in der Pestalozzi-Schule Lohmannsgasse (10 Min. vom Bahnhof). Günstige Zugverbindungen von den Bahnhöfen der Umgebung ermöglichen jedem Interessenten die Teilnahme ohne vorherige Anmeldung.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 342 Herzberg am Harz. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.